

RECENZO:

SCIENCE AND DEMOCRACY. The Relationship between Democracy and Scientific Achievements. (SCIENCO KAJ DEMOKRATIO. Rilato inter Demokratio kaj Scienca Atingo). W. Verloren van Themaat.

La aŭtoro ekzamenas la tezon, ke ekzistas pozitiva korelativo inter scienca atingo kaj demokratio, almenaŭ en la nuna jarcento. La esploro estis malfacila, ĉar oni devis precize difini la variablojn de la studaĵo. Unuavide la tasko ŝajnas nefarebla, sed van Themaat sukcesis analizi la problemon, kaj probable kiom eble plej bone li kreis matematikan bazon por la kalkuloj. Por tiuj kiuj atendus pozitivan kunrilatigon inter demokratio kaj scienca bonegeco, la rezulto estos surprizo.

La metodo por taksi sciencan atingon estas interesa. Van Themaat limigas la studon al Nobel-premiitoj en la fakoj de fiziko, ĥemio kaj fiziologio inter 1901 kaj 1983. Li klarigas la kialojn por tiel limigi la studon kaj diskutas la problemojn kiuj povus ekaperi se oni uzus alian metodon.

Ĉiu Nobel-premiito estas enkalkulita unufoje, ĉu li/ŝi ricevis nur onon de premio ĉu plenan premion ĉu premion pli ol unufoje. Ĉar la politika sistemo en pluraj landoj ŝanĝiĝis en la tempodaŭro de la studo, ofte pli ol unufoje, kaj ĉar sciencisto povas loĝi en pli ol unu lando, van Themaat atribuis po unu jaron al la lando por ĉiu jaro kiun la sciencisto tie pasigis, kaj simile unu jaron al la reĝimo. Li aplikis ambaŭ kriteriojn por la tuta vivo de la sciencisto, ĉar li konvinke argumentas, ke la jaroj antaŭ la honoro, eĉ la infanjaroj de la sciencisto, kontribuis al evoluo de la intelekta atingo.

Ĉar landoj multe varias laŭ nombro de la enloĝantoj, la aŭtoro korektas tion per kalkulo de la «Nobel-densecon».

La analizo de la politikaj sistemoj estis eĉ pli malfacila. Van Themaat detale sekciis laŭ jaroj la politikajn sistemojn, ekde proksimume la mezo de la 19a jarcento, de ĉiuj landoj kiuj kontribuis almenaŭ unu Nobel-premiiton. Por kvantigi la gradon de demokratio, la aŭtoro kalkulas la «voĉrajtajn jarojn» (la nombro de jaroj en la Nobel-epoko en kiuj estas universala [almenaŭ por viroj] voĉdonrajto en la lando) kaj la «regjarojn» (la nombro de jaroj en kiuj la voĉdonantaro efike elektis la administran branĉon de la registaro).

Post la perkompatora analizo oni vidas, ke kompareblaj landoj alimaniere ne montras konforman direktiĝon al pli grandaj sciencaj atingoj kiam ili progresas al pli demokrataj statoj. Efektive, la korelacio ofte estas milde negativa. Tio ne signifas, ke demokratio estas malfavora al scienca atingo, nur ke la influo de demokratio estas malgranda kaj facile nuligita de aliaj faktoroj. Van Themaat opinias, ke oni povas atribui la pli grandajn sciencajn atingojn de la demokrataj landoj al iliaj pli granda ekonomia prospereco kaj pli alta nivelo de populara klerigo kaj ne al iliaj demokrataj atingoj.

La metodoj disvolvitaj por efektiviigi la studon estas egale interesaj kiel la rezultoj. Van Themaat agnoskas la limojn de sia analizo. Li libere diskutas la problemojn kiujn li devis solvi kaj la decidojn ofte arbitrajn kiujn li devis fari por kompili la haveblajn informojn. Oni sentas, ke lia aliro al la demando estas honesta, la laboro bone farita kaj la konkludo probable ĝusta.

— S. Norvell.